

Jubileoj

Niaj jubileantoj: Boriša Milićević – okdekjaraĝa PLI RIĈA VIVO – DANK' AL ESPERANTO

Nia membro, monde konata esperantisto kaj tradukanto, profesoro Boriša Milićević ĉi-jare estas okdekjaraĝa. Tio estas kialo por paroli kun li pri lia esperanta aktivado kaj tion publikigi en nia revuo “Beograda verda stelo”. Tio estas nur ŝuldo de ni, esperantistoj, al homoj kiuj restas fidelaj al la internacia lingvo pli ol duonon de jarcento kaj restigis rimarkindajn signojn en Esperanto-movado de Serbio.

MILIĆEVIĈ BORIŠA naskiĝis la 14-an de oktobro 1931 en Pepeljevac apud Kuršumlija (Serbio), de la patro Jeremija, oficisto, militkaptito en Germanio dum la 2-a mondmilito, kaj de la patrino Katarina, dommastrino.

Frekventis elementan lernejon en Kuršumlija, gimnazion en Kuršumlija kaj Prokuplje, kaj diplomitiĝis ĉe la Filologia fakultato en Beogrado. Frekventis ankaŭ la ĵurnalistan lernejon ĉe Jugoslavia Instituto de ĵurnalismo en Beograd.

Faris fakan profesoran ekzamenon, fakan ekzamenon por profesia turista gvidanto (kun 6 fremdaj lingvoj) kaj fakan bankistan ekzamenon pri bankaferoj kun eksterlando.

Parolas kaj skribas en 8 (ok) fremdaj lingvoj (franca, germana, angla, hispana, portugala, itala, rusa kaj la internacia lingvo Esperanto). Estas oficiala (jurinta) tradukanto de kvar fremdaj lingvoj (franca, germana, hispana kaj portugala).

Oficis je instruado (Okklasa lernejo, Raĉa apud Kuršumlija, Laborista gimnazio, Niš, Laborista universitato, Niš, instruado de Esperanto), turismo (“Putnik”, Turist-gastiga entrepreno “Nišava”, Niš), Protokolo (Distrikt-Asembleo, Niš, Asembleo de SAP Vojvodino, Novi Sad), informado kaj dokumentado (Distrikt-Asembleo, Niš), bibliotekaj aferoj (Federacia Centro por trejnado de Profesiuloj en Agrikulturo, Novi Sad, Instituto por fruktoj kaj legomoj, Novi Sad), internacia kunlaboro kun OECD (Federacia Centro por trejnado de Profesiuloj en Agrikulturo, Novi Sad), bankaferoj kun eksterlando, banktarifoj kaj banknormoj (Vojvoĉanska banka, Novi Sad, Privredna banka, Novi Sad).

Oficperiodon finis kiel konsilisto pri bankrilatoj kun eksterlando en Deviza Sektoro de Privredna banka, Novi Sad. Pensiulo ekde la 1-a de decembro 1997.

Fariĝis esperantisto kiel studento en 1953 en Esperanto-societo, Beograd. Kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo en Beograd en 1954. Samjare (1954) vojaĝis per biciklo de apud la germana urbo Ulmo ĝis Parizo kaj de Parizo ĝis la jugoslavia limo.

Plenumadis diversajn gravajn funkciojn en Esperanto-societoj, Vojvodina Esperanto-Ligo, Serbia Esperanto-Ligo kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo.

Estis ĝenerala sekretario de TEJO-Kunvenoj (1955-1956), kaj trifoje JEL-delegito (1977-1979, 1983-1986, 1992) en UEA-Komitato, Rotterdam.

Nuntempe li estas delegito de UEA por urbo Novi Sad.

Ekde 1984 plenumas volontule la funkcion de direktoro de Esperanto-Instituto de SEL. Li havis ankaŭ plurajn rimarkindajn ne-Esperantajn funkciojn. Posedas C-diplomon



(profesoro de Esperanto). Dum jaroj gvidis diversgradajn Esperanto-kursojn, inkluzive la mallongan Esperanto-kurson kun Gordana Dražić, profesorino, je Radioj Kać kaj Šid, en sepdekaj jaroj, kaj Esperanto-kurson kun Vladimir Kirda je Radio Novi Sad en 1984.

Estis en ĵurio de la revuo Voĉo, Borovo en 1976, kaj en ĵurio de Esperanto-societo, Malto por aprezo de E-tradukoj de la poemoj de Maltaj poetoj en 1989.

Estis redakciano de la revuo Voĉo, Borovo en 1978-1979, kaj membro de ĝia Eldonkonsilio en 1980-1981.

Estis respondeca redaktoro de la Gazeto de Vojvodjanska banka, Novi Sad en 1986-1987, kaj respondeca redaktoro de Bulteno de Esperanto-societo "Marko Nešić", Novi Sad dum 1984-1988.

Kunlaboris en diversaj ne-Esperantaj kaj Esperantaj gazetoj ekde 1954 ĝis nun.

Dum jaroj li okupiĝis pri tradukado al Esperanto kaj el Esperanto. Redaktis 4 Esperanto-kolektojn/antologiojn.

Reprezentita en Esperanto/antologioj de Serbio, Makedonio, Kroatio, kaj Bosnio kaj Hercegovino.

Menciita laŭ la tradukaĵoj en la monda (enciklopedia) publikaĵo "Esperanto en Perspektivo" (UEA/Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo, Londono-Rotterdam, 1974).

Prezentita en "Leksikono de Aktivaj Jugoslaviaj Esperantistoj" (Voĉo, Borovo, 1985), en "Enciklopedio de Novi Sad", Kajero 15, MIL-MOB (Novisada Klubo "Prometej", Novi Sad, 2000), kaj en "Esperantistoj en Serbio" (ES "Radomir Klajić", Beograd, 2006).

Dum jaroj li okupiĝis pri bibliografio de Esperanto-eldonaĵoj en Jugoslavio, Serbio, Kroatio, Respubliko Serba (BkH) kaj Makedonio. Lia Propra bi(bli)ografio estas aperigita libroforme en Banja Luka en 2008.

Distingita per Medalo de Laboro fare de Prezidanto de Respubliko, Ordeno por meritoj en Esperanto-movado fare de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Gajnis Oran Insignon de Serbia Kultur-kleriga Komunumo kaj Plakedon de Serbia Unuiĝo de sciencaj kaj fakaj tradukistoj, kaj aliajn rekononjn.

Oficiale, aŭ koncerne Esperanton, aŭ private, vizitis 18 landojn: de Eŭropo (14), Afriko (2), Ameriko (1) kaj Azio (1).

Multaj diras, ke viajn unuajn paŝojn en vera Esperanto-mondo vi travivis internacie, dum la lastaj studjaroj. Rakontu pri tio!



Oni povus diri tiel: mi komencis lerni la internacian lingvon Esperanton en marto 1953 en Beogrado. Mi rapide progresis kaj jam en la jaro 1954 mi korekte parolis kaj skribis la lingvon. En Beograda E-societo mi ekkonis plurajn elstarajn esperantistojn: Radomir Klajić, prof. Momčilo Šaponjić, advokaton Jakob Stefančić, prof. D-ron Boĵidar Popoviĉ, komponiston Boĵidar Trudić, kolonelon Antonije Sekelj, mondvojaĝanton Tibor Sekelj...

En tiu jaro ni, pluraj studentoj, formis Studentan Esperanto-Klubon "Bajo Sekulić". Kaj baldaŭ poste ni organizis dramon grupon kadre de la Klubo, kaj prezentis dramojn de B. Nušić en Esperanto en Beogrado kaj L'Aquila (Italio). Mia patro Jeremija devis esti militkaptito en Germanio dum pli ol kvar jaroj. Ni interparolis ke estus eble interese ke mi foje, naŭ jarojn post lia reveno, vizitu la germanan familion kie li laboris dum la militkaptiteco, en la vilaĝo Watenweiler apud Krumbach, en Bavario. Li menciis la biciklon kiun li havigis post la liberiĝo, kaj kiu eble plukuŝas ie ĉe tiu familio. (Sur foto: Boriša 1955)

Sekve, mi komencis pensadi pri mia forveturo tien. Kaj tion mi faris en julio 1954. Pertrajne mi atingis Munkenon, kie mi renkontis s-ron K. Deubler el E-grupo „Laboro“. Sekvis la Urbo Ulm kaj Neu-Ulm, kaj de tie la vilaĝo Watenweiler, kie ni tamen trovis subtegmente la biciklon de mia patro. Tiam mi decidis veturadi per biciklo al Francio. Ulm kaj Neu-Ulm impresigis min kaj mi verkis la artikolon pri tio en LA POGRESO, Beograd, n-ro 8-9, 1954, kun la titolo VOJAĜIMPRESOJ.

Biciklante mi, vizitinte Esperanto-hejmon en Baden-Baden, fine atingis Nancion, kie estis okazonta la 27-a SAT-Kongreso komence de aŭgusto 1954. Tie mi renkontiĝis kun du bonegaj francaj fraŭlinoj Monika kaj Margareta, kaj poste ankaŭ kun Velja Mihajlović kaj Dušanka. Ankaŭ tie mi ekkonis la estaran aktoron Srdjan (Serĵ) Flego kiu aranĝis ke mi, dum la amuza Kogresprogramo, ludu ŝalmon. Interesa okazaĵo: tie mi renkontiĝis kun unu angla biciklo-vojaĝanto kun la manko de manplato. Sed la manko estis fake kompensita kaj li povis bonege bicikli. Kun li pertrajne mi atingis Parizon kaj restis kelkajn tagojn. Tie, unu tagon mi vizitis Esperantejon „Tri koboldoj“. Laŭkutime, la gasto ekstaras sur la seĝon, salutas kaj devas aŭ ion reciti aŭ elrakonti aŭ kanti aŭ muzikludi. Ankaŭ mi faris tion – salutis kaj ludis ŝalmon. Tie mi ekkonis la elstaran E-verkiston Rajmond Švarc.

Mi revenis al Jugoslavio plejparte per biciklo, kaj parte pertrajne, kaj parte perpiede, tra Svislando kaj Aŭstrio.

Kompreneble, Vi daŭrigis vian E-aktivadon internaciskale-1955?

Estas jam konate ke kadre de Studenta Esperanto-Klubo en Beogrado ni fondis en 1955 Draman (kultur-amuzan) grupon. Interkonsente, mi iĝis grupestro. La Grupon, krom mi, konsistigis Radmila Petronijević, Katarina Popović, Anđelka Janković kaj Momir Milojević. En L'Akvila aliĝis al la Grupo Milan Marković kiu alvenis por partopreni la 11-an IJK en L'Akvila.

Post preparo, la Grupo ekvojaĝis la 25-an de julio 1955 al Italio. Tra Venecio ni atingis Padovon, kie ni renkontiĝis kun esperantistoj kaj vespere prezentis en E-o la teatraĵon de B. Nuŝiĉ „Analfabeto“.



Foto: Esperanto societo „Radomir Klajić 1954

La 28-an de julio ni forveturis al Bolonjo, kie okazis la jubilea 40-a UK de Esperanto. Tie ni trovis nian Beogradan klubanon Dobrica Milovanović, kiu helpis nin por tendumejo.

Dum la postsekva tago okazis Interkona vespero, kaj ni renkontiĝis kun du IJK-funkciuloj el L'Akvila, kun kiuj mi poste plejparte kunlaboris por IJK (Internacia Junulara Kunveno). Ni grupanoj estis en popolaj kostumoj, kaj kiel tia mi ludis konatan popolan instrumenton ŝalmon.

La 31-an de julio, post la solena malfermo de UK, vespere okazis Gejunula vespero. Dum la sekva vespero okazis Gejunula vespero, dum kiu mi interparoladis kun la funkciuloj de la 11-a IJK.

Post la aktivado en Bolonjo, ni la 3-an de aŭgusto foriris al Firenze (Florenco). Interkonsente, la Grupo restis en Firenze por du tagoj, kaj mi forveturis, tra Romo, al L'Akvila por aliri la preparojn de IJK, kaj atingis ĝin la 4-an de aŭgusto dumnokte.

Analizinte la aferojn, mi promesis proponi al la jarkunveno la tutan organizan strukturon. Post tritaga laborego, mi sukcesis ellabori ĝin por la jarkunveno.

La 8-a de aŭgusto estis nia tago. Nia grupo prezentis la teatraĵon „Analfabeto“.

La roloj estis jenaj:

Distriktestro	Boriša Milićević
Miko skribisto	Momir Milojević
Sveto skribisto	Milan Marković
Edzino de distriktestro	Radmila Petronijević
Bopatrino	Anđelka Janković
Policano	Giorgio Marinucci

Post la prezento de la teatraĵo, mi ludis tri-kvar rondodacojn per ŝalmo.

La 10-an kaj la 11-an de aŭgusto okazantis la Jarkunveno de TEJO. Mi prezentis mian kompletan organizprogramon kiu estis tutece akceptita. Mi fakte prezidis la Jarkunvenon.

Estis aprobitaj TEJO-Regularo kaj organoj de TEJO. Mi estis elektita por Konstanta Kunvena Sekretario. La 11-an de aŭgusto Momir partoprenis la 100-metran kuradon kaj atingis la plej bonan rezulton. Nia teatraĵo estis plej bone prezentita kaj pro tio ni ricevis la unuan premion – unusemajnan senpagan restadon en L'Akvila. Ne povinte resti ankoraŭ unu semajnon, ni interkonsentis ke la organizantoj pagu al ni per aŭtobusan vojaĝon ĝis Romo, de kiu ni havis revenbiletojn ĝis Beogrado.

Per tio ĉi finiĝis efektive mia E-agado en Beogrado, ĉar pro financaj kaj loĝproblemoj mi devis forlasi Beogradon kaj forvojaĝi al mia naskiĝloko, kaj poste mi devis posteniĝi en Rača apud Kuršumlja, en la okklasa lernejo. Dum tiu jaro mi gvidis unu E-kurson por la lernejoj.

Post unu jaro mi translokiĝis en la urbon Niš, kie mi vivis kaj E-agadis dum dek jaroj.

Via Niša dekjara esperantista periodo estis longa. Ĉu ĝi estis sukcesa?

En la dua duono de la jaro 1956 mi translokiĝis familie (en la antaŭa jaro mi edziĝis) en Niš kaj restis dek jarojn. Mi tuj aliĝis al la urba Esperanto-societo kaj poste al Fervojista Esperanto-societo. La agado en Niš estis diversflanka.

Mi daŭrigis okupiĝi pri mia amatora aktorado. Kiel aktoro-amatoro mi partoprenis en kelkaj jarkunvenoj de JAFE.

Mi kunlaboris kun E-gazetoj per diversaj E-tradukoj. Dum jaroj mi okazigis plurajn pri-Esperantajn prelegojn.

En 1957 mi partoprenis en Somera Pedagogia Semajno en Kranjska Gora, kie mi ekkonis plurajn por mi novajn personojn.

En 1963 mi parte partoprenis la 48-an UK de Esperanto en Sofio.

En la jaro 1965 aperis stencilite, dulingve (serbe kaj Esperante) *Pesme ljubavi i rodoljublja – Kantoj de 1^a amo kaj patriotismo*, kiujn mi esperantigis. Ĝi entenas 14 poemtradukojn de 11 aŭtoroj el Jugoslavia literaturo kaj 4 popolajn kantojn (melodiojn).

Eld. Centralno KUD železničara “Stanko Paunović” – Dramski esperantski studio, Niš, 1965.

Tiu ĉi publikaĵo estas menciita kun mia nomo en la rimarkinda libro „Esperanto en perspektivo“ de Ivo Lapenna (UEA, 1974, p. 222-a).

En la jaro 1966 mi tradukis el la hispana, kun la permeso de la aŭtoro, E-lernolibron de Daniel Quarello el Argentino „Sintesis de Esperanto para principiantes“. La traduko estis stencilita en FES kiel „Udžbenik esperanta za početnike“.

Tiujare finiĝis mia restado en Niš. Poste mi trenslokiĝis al Beogrado, kaj fine al Novi Sad, kie mi ankaŭ nun vivas.

Post tio en la dua duono de Via vivo, mi opinias ke estas la plej fruktoriĉa laŭ E-agado (1970-2011). Diru ion pri tio.

En Novi Sad mi ekvivis ekde la jaro 1970 kaj ankaŭ nun estas en ĝi. Tie okazadis mia tre grava diversflanka Esperanto-agado.

Mia pli vasta E-kunlaboro ne ĉesis. Dum la 58-a UK de Esperanto en 1973 en Beogrado mi estis turista E-gvidanto en Beogrado kaj Novi Sad.

Dum la 63-a UK en 1978 en Varna, Bulgario mi estis delegito de JEL.

En 1988 mi partoprenis Interlingvistikan konferencon en Budapeŝto, nome de Serbia E-movado.

JEL-kadre, mi partoprenis plurajn landajn E-kongresojn.

En 1976 mi partoprenis la 20-an JEL-kongreson en Prilep, Makedonio kaj prezentis mian referaĵon Egalrajteco de nacioj kaj nacigrupoj kaj lingvoj en Vojvodio.

Sekvis JEL-kongresoj en kiuj mi aktivis: Ŝkofja Loka 1983, Banja Luka 1987 kaj Subotica 1991. Mi konstante zorgis pri instruado de Esperanto per adekvate kaj facile alireblaj lernigiloj.

Jam en 1973 mi igis pli korekte stencili en 1973 mian tradukon, laŭ permeso de la aŭtoro, de *Udžbenik esperanta za početnike (Sintesis de Esperanto para Principiantes, de Daniel Quarello, Buenos Aires, 1962)*.

Nelonge post tio mi interkonsentis en Radnički univerzitet “Radivoj Ćirpanov”, Centar za učenje stranih jezika, Novi Sad, verki *Udžbenik esperanta za ekspresne kurseve (Esperanto-lernolibro por ekspresaj kursoj)*, kiun en 1974 aperigis tiu ĉi institucio kun ES “Marko Nešić”, Novi Sad. Ĝis 2004 aperis ankoraŭ 8 eldonoj, presite aŭ stencilite, en Novi Sad, kaj unu presita (7-a) eldono en Banja Luka (en 1997). Ĝi aperadas en daŭrigoj en la revuo *Beograda Verda Stelo* ekde la jaro 2006.

Mi konstante atentis, por propagando/informado, pri la historio kaj strukturo de Esperanto kaj aperigis kvar broŝurojn pri tio (1979, 1988, 1998, 1998) el kiuj unu kunaŭtoro kun Zlatoje Martinov.

En 2001 mi prezidis, kiel institutestro, la 5-an Danuban Esperantlingvan Sciencon kaj Kulturan Forumon (7-10 junio 2001) en Beogrado.

Komprenoble, mi kunlaboris dum jaroj kun enlandaj kaj eksterlandaj E-gazetoj/revuoj.

Estas grave ke mi konstante estis atentema al tradukado de naciaj aŭtoroj kaj same tiuj de naciaj minoritatoj, kies verk(aĵ)oj prezentiĝis vaste pere de Esperanto. Kaj esperantigis multajn verk(aĵ)ojn kiuj aperis libroforme aŭ en diversaj gazetoj/revuoj.

Mi okupiĝas ankoraŭ pri unu grava kampo – bibliografio de niaj E-eldonaĵoj. Mia propra bi(bli)ografio – Sopstvena bib(bli)ografija estas prezentita, danke al D-ro Ljubiša Preradović el Banja Luka, en la libro kun 60-o da paĝoj.

Neniu Esperanton lernas por paroli kun “niaj”, sed por kontaktoj kun esperantistoj en diversaj landoj. Diru pli pri Via kunlaborado kun geesperantistoj en- kaj eksterlande, mi kredas ke ekzistas interesaj kontaktoj kun mondfamaj esperantistoj.

Preskaŭ ekde la komenco de mia esperantistado mi komencis korespondadi kaj kreadi kunlaborajn kaj amikajn rilatojn kun esperantistoj enlande kaj tra la mondo. En 60-aj jaroj tio intensiĝis kaj longe daŭris.



*Al mia sataĵo sum-
batulanta Boriša Milicević,
amiko,
Audriole
Hago, 14-8-1958*

(Ricevita la 16/8-1958).

Foto: Andreo Cseh kaj lia dediĉo de foto al Boriša

Mi korespondis kun unu el elstaraj esperantistoj kaj kreantoj – Andreo Cheh (elparolu ĈE, sen “h”), fondinto de Internacia Esperanto-Instituto en Nederlando kaj kreinto de la fama Ĉe-metodo de Esperanto-lernado. Li sendis al mi sian foton por rememoro. Mi estis abonanto de la revuo „Praktiko“ kaj sporade kunlaboris en ĝi.

Mi korespondadis ankaŭ kun la konata, altkvalita longjara ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto, Ada Sikorska. Tre viva korespondado, antaŭ tio, estis kun la hungardevena aktiva esperantisto el Svedio Ŝandor Kassai. S

Dum tiuj jaroj mi havis tre vastan korespondadon tra la mondo. En 60-aj jaroj mi mebrigiĝis en UEA kaj plueŝtis ĝia individua membro kaj delegito por Novi Sad. Dum la 58-a UK en 1973 en Beogrado mi estis turista E-gvidanto kaj konatiĝis kun multaj personoj. Dum la 63-a UK en 1978 en Varna mi konatiĝis kun la elstara E-verkisto William Auld.

Dum la 5-a DESKF en 2001 en Beogrado mi konatiĝis kaj poste aktive kunlaboris kun Renato Corsetti (Korseti) pri diversaj E-kampoj.

Kun esperantistoj el Banja Luka, RS-BkH mi kunlaboras dum jaroj. Mia tiea granda amiko kaj kunlaboranto estas d-ro Ljubiša Preradović.

Ankaŭ kun esperantistoj el Prilep, Makedonio, Metodi Galeski kaj lia filo Viktor mi kunlaboras multjare. Ĝuste ĉi-jare aperis tie kiel libro mia traduko „Laŭ spuroj de la skibo kaj de la lingvo de antikvaj makedonoj“. Estis akoraŭ pluraj aliaj, sed ne eblas mencii ĉiujn.

Inter Jugoslaviaj amikoj kaj kunlaborantoj estas tre menciindaj Marinko Ĝivoje, Emilia Lapenna kaj Vlado Jurković (Radio Zagreb, Esperanto-Redakcio), kaj aparte Josip Pleadin kun kiu mi plue kunlaboras.

En Serbio mi konis Radomir Klajić, Branko Rajšić, prof. Momčilo Ŝaponjić kaj Jelena Ŝaponjić, Jakob Stefančić, Tibor kaj Antonije Sekelj, d-ron Bojidar Popović, Vesna Skaljer-Race, Bojidar Trudić, Ĵivko Ivanović, mgron Gvozden Sredić, Ludovikon Sekereš, Nedeljka Subotić, Margarethe-Greta Stoll...

Inter la E-institutanoj elstaras miaj amikoj Dimitrije-Diso Janičić, mgro Zlatoje Martinov, d-ro Miodrag-Mića Stojanović, d-ro Pribislav-Priba Marinković el Beogrado, Adem Jakupović el Zemuno, Jovan-Ĵan Janković el Niš. Aparte, mia amiko estas ankaŭ la verkisto Vladimir-Vlada Kirda Bolhorves el Novi Sad. Pardonu tiuj, kiujn mi ne menciis, ĉar mia rondo de konatoj, korespondantoj, kunlaborantoj, amikoj estas vere vasta kaj multjara.

Tia vasteco vere pliriĉigis miajn bonhumoron, interesemon, komprenemon, diversajn konojn kaj nombron da amikoj, kiujn mi sen Esperanto eble ne tiom havus.

Problemoj en kontaktoj?

Koncerne, la kontaktadon kaj korespondadon kun esperantistoj, mi ĉiam havis reciproke amikajn rilatojn. Gravaj misoj forestadis.

Vi multe tradukis en kaj el Esperanto. Laŭ tiu Via laboro vi estas tre konata en areoj de iama Jugoslavio kaj en la mondo. Diru mallonge, sed aparte, pri Via E-tradukado!

Mi ja komencis tradukadi tre baldaŭ post la esperantistiĝo, sed la ĉefa tiusenca agado komencis okazadi en la okdekaj jaroj.

En 1981 aperis en Prilep Makedona Antologio (poezio kaj prozo). Ĝi entenas 12 prozaĵojn kaj 36 poeziaĵojn de 48 aŭtoroj. Mi esperantigis ses poemojn kaj unu prozaĵon, kaj kuntradukis unu prozaĵon kun Stanoja Stojić. Mi kunreviziis ĝin kun Marinko Ĝivoje. En 1983 aperis en Novi Sad Lirika Poemaro el Vojvodino (Serbio). Mi elektis, redaktis kaj plejparte tradukis. Ĝi entenas 64 poemojn de 43 aŭtoroj – srblingvaj (19), hungarlingvaj (9), slovaklingvaj (6), rumanlingvaj (5) kaj rutenlingvaj (4). Samjare (1983) aperis Kroatia Poezio. Ĝi entenas 194 poemojn de 68 aŭtoroj. Mi tradukis 6 poemojn.

En 1989 aperis en Sarajevo Moderna Bosnia-hercegovina novelo. Antologio (Savremena bosansko-hercegovačka novela. Antologija). Ĝi entenas 25 novelojn de 25 aŭtoroj. Mi tradukis 3 novelojn.

Samjare (1989) aperis en Ohrid, Makedonio Ora Girlando de Poezivesperoj de Struga (Златен венец на струшките вечери на поезијата). Redaktis Usni Zemoski. Ĝi entenas 25 poemojn de aŭtoroj el la tuta mondo. Mi esperantigis 19 poemojn.

Samjare (1989) aperis Mi esperas amon. El poezio de la nealiancaj landoj (Nadam se ljubavi. Iz poezije nesvrstanih zemalja). Ĝi entenas 31 poemojn de 26 aŭtoroj el 18 landoj de Afriko (8), Azio (8) kaj Eŭropo (2). Mi elektis, redaktis kaj tradukis 26 poemojn.

En 1998 aperis en Beograd Antologio de la serba poezio (1200-2000) - /Antologija srpske poezije (1200-2000)/. Kompilinto kaj ĉefredaktoro: Srdj Arandjelović. Ĝi entenas 284 poemojn de 92 aŭtoroj. 25 tradukintoj. Mi tradukis 17 poemojn de 11 aŭtoroj.

En 2003 aperis en Novi Sad Poeziaj donacoj. Originaloj kaj tradukoj (Pesnički darovi. Originali i prevodi). Ĝi entenas 16 poemojn de 9 aŭtoroj. Mi elektis, redaktis, faris tradukojn kaj kunmetis biografiojn.

En la n-ro 219, 2006 de Literatura Foiro, kultura revuo en Esperanto, Vraca, Bulgario (Književni sajam, kulturni časopis na esperanu) aperis 20 miaj tradukoj de poemoj de 16 Afrikaj aŭtoroj.

En la n-ro 3, 2007 de Шветлосц, часопис за литературу, культуру и уметносц – Lumo, revuo pri literaturo, kulturo kaj artoj, Novi Sad, aperis 15 tradukoj de poemoj de 11 Vojvodinaj rutenlingvaj aŭtoroj).

Krome, rimarkinda nombro de poemtradukoj aperis en diversaj enlandaj kaj internaciaj E-revuo.

El prozaĵoj, mi esperantigis la rakonton de la elstara verkisto Petar Kočić “Mrguda” kaj ĝi aperis dulingve en Banja Luka (Respubliko Serba – BkH) en 1996.

Mia traduko de la romano de la konata verkisto Simo Matavulj „Bakonja frat’-Brne“ (Bakonja fra-Brne) aperadis en daŭrigoj en Beograda Verda Stelo, Beogrado ekde la fino de 2006 ĝis la fino de 2011.

Mi okupiĝis ankaŭ pri scienc-faka kaj turisma tradukadoj.

Kompreneble restis neindikita konsiderinda nombro de aliaj E-agadoj. Sed ne eblas ĉion prezenti.

Ĉu Via familio estas Esperanta?

Mia gepatra familio, inkluzive de frato, ne havis rektan ligon rilate al Esperanto, ĉar mi tiam vivis nekune kun ili (unue studado en Beogrado, kaj poste oficado en Raĉa apud Kurŝumlija kaj Niŝ, kaj fine en Novi Sad. Post edziĝo, mia edzino ne havis ion ajn kontraŭ Esperanto. Miaj filoj (2) ne okupiĝis pri Esperanto, ĉar ankaŭ ili vivis aparte, sed tre respektis mian esperantistan agadon.

Kie estas arkivo de VEL?

Kun Vojvodina Arkivo mi enordigis la rilatojn, transdoninte komplete la arkivon de VEL, kun kvar libroj. La arkivo de E-Instituto estas ĉe mi, ĉar ĝi formale ne apartenas al Vojvodino. Ĝia sidejo estas en Beogrado.

Donu al mi unu mallongan verkaĵon

Mi havas kelkajn originalajn poemojn en Esperanto. La plej plaĉa al mi estas AMSENTO:

AMSENTO

Amo senĉese ardas, intensas,
Nestas profunde en mia koro;
Karesa dolĉo anime densas,
Interne regas benigna horo;
Ci, karulino, se mi ekpensas,
Al mi estiĝas gracia floro.

Kion vi intencas fari kun Via biblioteko?

Koncerne mian bibliotekon. Por nun mi ne priprensadis kion per ĝi. Estas normale doni tion kio estas uzebla por la lernado al miaj nepinoj en Niŝ. Pri alio oni vidos. Estas en ĝi konsiderinda nombro de E-libroj.

Diru al ni iu vojaĝan rememoron!

Pri ĝisvivaĵoj: siatempe mi veturigis la biciklon en Francio kaj renkontinte la vojlaboristojn kiuj demandis min kien mi vojaĝas. Mi respondis: en Jugoslavion. Je tio ili komencis ridegi kriante „huit, huit“ (uit, uit = ok, ok). Turninte min malantaŭen, mi rimarkis difekton de la malantaŭa rado kiu rotaciis „okece“ kaj mi konfuzite kunridegis. Poste mi devis piediri konsiderinde ĝis riparigo de la rado.

Mi ekremomoris unu ŝercokazaĵon: iu homo iris al kuracisto kaj neklare eldiris kion li volis. La kuracisto, ne kompreninte lin, nerveme diris: „Idioto“. Kaj la homo tuj respondis laŭnome: Ne, mi estas Petro.

Kaj tiel finiĝis ilia interkompreno.

Via konkluda mesaĝo?

Jen la lasta parto de miaj alskribaĵoj al vi koncerne mian 80-jarecon. Anticipan amikan dankon por via klopodo prezenti min okaze de mia 80-jara datreveno, kaj elkoran saluton al ĉiuj legantoj de nia revuo.

Intervjuis: Dimitrije Janiĉić

La intervjuo aperis en Beograda Verda Stelo (JARO VI, NUMERO 16)